# Pola Esperantisto

Nro 8—9

XXX JARO AŬGUSTO—SEPTEMBRO 1936

Esperantysta Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID — MGR. TAD. HODAKOWSKI

APERAS 1-an DE ĈIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI ĜIS LA 20-a DE ĈIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO ŜANĜI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.


## VII. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO EN KRAKOVO.

**31. 5. 1936 — 1. 6. 1936.**

(Fino)

Post komuna tagmanĝo okazis ĝenerala kunveno de P.E.D. La rajtigitaj delegitoj okupis la lokojn ĉe la tabloj en la unuaj vicoj de la kunvenejo. Ĉiu rajtigita delegito ricevis de la sekretario specialan ruĝan emblemon kun surskribo „rajtigita delegito". Tiuj emblemoj estis portataj dum la kunsido, por ke ne ekestu dubo, kiu rajtas voĉdoni. La cetera publiko okupis lokojn en pluaj vicoj.

La kunsidon prezidis Dro Rosenstock, kiu atentigis la delegitojn pri la graveco de la kunsido, okazanta unuafoje post la legalizo de la nova statuto de PED.

Ĝenerala sekretario de PED prof. Hodakowski raportis pri la agado depost la lasta Landa Kongreso en Varsovio en la jaro 1933.

Li skizis la malfacilaĵojn kaj malhelpojn, ne permesintajn, ke intertempe okazu landa kongreso. La grupoj en Gdynia kaj Płock malgraŭ la invitoj, faritaj dum la lasta kongreso, rifuzis preni sur sin la organizon de la kongreso. Same Katowice, Tarnów kaj Lwów ne povis preni tiun taskon. Tial denove Krakovo, sidejo de PED, akceptis la ŝarĝon aranĝi landan kongreson.

Unu el la plej gravaj akiraĵoj de PED estis, ke ĝi fine ricevis leĝe aprobitan statuton. Ĝin pripensis kaj konformigis al la aktuala pola leĝaro advokato dro Leono Rosenstock, meritanta grandan dankon pro la granda laboro. La nova statuto estis publikigita en „Pola Esp." kaj dissendita al ĉiuj esperantaj grupoj en Pollando kun invito aliĝi al PED.

Por la Universala Kongreso en Stockholm PED aranĝis grandnombran ŝipekskurson, bone sukcesintan. La ekskurson partoprenis rimarkinda nombro de delegitoj de UEA kaj de ĉefaj esperantistoj. Profitante tion, dum la revenvojo estis aranĝita sur la ŝipo kunsido, dum kiu estis fiksitaj ne nur gvidindikoj por la plua agado de PED, sed ankaŭ estis priparolataj la aferoj, koncernantaj la landan kongreson, kiel ankaŭ la jubilean U-

niversalan Kongreson en Varsovio dum 1937. La ŝipekskurson gvidis kun modela precizeco s-ro Kutscher.

La vienan konferencon pri edukado partoprenis prof. dro Bujwid, kiel prezidanto de PED kaj ankaŭ en sia propra nomo.

La Universalan Kongreson en Roma en la jaro 1935 partoprenis rimarkinda aro da polaj samideanoj, kiujn kolektis kaj pri kiuj zorgis s-ro Kutscher, komisiita de la estraro de PED.

PED disponigis propagandan materialon pri Pollando al la organizantoj de la tutmonda skolta ĵamboreo Gödöllö en la jaro 1934. Simile ĝi agis okaze de tutmonda skolta ĵamboreo en Spała en pasinta jaro (La urbestraro de apuda Tomaszów Mazowiecki eldonis pro tiu okazo interkonsente kun Turisma Servo de UEA esperantlingvan ilustritan gvidilon, tradukitan esperanten de CD de UEA s-ro Ŝapiro. PED helpis ankaŭ al la aranĝantoj de propagandaj ekspozicioj.

Kunsidoj de la estraro de PED okazadis regule. Oni pritraktadis ne nur aferojn de la landa movado, sed ankaŭ zorge sekvis la demandojn de la internacia Esperanto-movado. I. a., kiam ekestis la problemo UEA—UFE, PED decide ekstaris ĉe UEA, kunlaborante plue kun ĝi.

PED vigle interesiĝas pri la preparadoj por la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en la jaro 1937 kaj kune kun LKK respondecas pri ĝia sukceso.

Tre grava afero, kiun daŭre gvidis PED, estis la radioprelegoj. Dum la raportata periodo ili okazadis 1—3 fojojn dum monato, escepte la someraj monatoj, kiam la polaj radiostacioj entute ne disaŭdigadis fremdajn lingvojn. Multe helpadis la laboron s-ro Krysztofowicz el Bydgoszcz, al kiu PED ŝuldas koran dankon. La jarlibro de la Pola Radio enhavas varman aprobon de la Esperanto-prelegoj, kio pruvas la plenan kontentecon de la estraro de „Polskie Radjo".

Bedaŭrinde, laste la afero iom ŝanĝiĝis, ĉar ekmankis subteno de samideanoj, instigantaj kaj dankantaj la estraron. La estraro volus ĉiam vidi kreskantan intereson por la afero. PED esperas, ke aŭtune la Esp. disaŭdigoj ekfunkcios kaj ke ili estos pli regulaj pro la alproksimiĝanta Universala Kongreso en Varsovio.

La apartaj prelegoj estas presataj en „Pola Esp." kaj poste ili aperos kiel aparta broŝuro. Ĝi helpos diskonigi alilande polajn sciindaĵojn. La prelegoj — kiel konate — estas prilaboritaj de plej eminentaj fakuloj.

Unuarangan propagandan valoron havis speciala numero de „Nia Gazeto", dediĉita al Pollando. PED klopodis kaj helpis en tiu afero.

Post tiu raporto la kasisto de PED s-ro Alfus tralegis la kasan raporton. Ĝi ne estis tro ĝojiga, ĉar multaj grupoj nur pene pagas sian kotizon al la landa organizaĵo. Tamen PED plenumas ĉiujn siajn devojn rilate al la internacia movado. — La raporton de la Revizia Komisiono legis s-ro Wiesenberger.

La kunveno aprobas unuanime ĉiujn raportojn.

Oni transiras al la elekto de la gvidantaj organoj de PED. Dro Rosenstock transdonas lo prezidon al red. Ŝapiro, kiu vokas la rajtigitajn delegitojn Pruski kaj Rytenberg, kiel membrojn de komisiono por kontroli la voĉdonadon.

## NOVAJ GVIDANTAJ ORGANOJ DE PED.

La sekreta voĉdonado donas jenan rezulton:

Estraro: prof. dro Odo Bujwid (prezidanto), inĝ. Eugenio Tor, adv. dro Leono Rosenstock, Jozefo Alfus, mgr. Tadeo Hodakowski, Ludoviko Kutscher, f-ino Rena Weinsberg.

Revizia Komisiono: Dir. Kostecki, Toczyski (Lwów), f-ino Ćwiklińska; kandidatoj: f-ino Zagajewska, Sowiński.

Ĉefkonsilantaro: s-ro I. Wiesenberger kaj s-ino M. Szczepańska el Krakovo, ministeria konsilanto Wyszyński el Varsovio kaj kapitano Silhan, prezidanto de UABO. Krom tio laŭstatute ĉiuj Esp.-societoj el Varsovia vojevoda distrikto devas kune elekti unu delegiton al la ĉefkonsilantaro kaj samon devas fari la Esp. societoj en Silezio.

Poste ĝenerala kunveno de PED laŭstatute fiksis la altecon de la kotizo kaj priparolis la demandon pri la sekvonta landa kongreso. Oni decidis, ke ĝi okazu laŭeble antaŭ aŭ dum la Universala Kongreso en Varsovio.

**LABORKUNSIDO DE LA KONGRESO.**

Tuj post fino de la ĝenerala kunveno de PED komenciĝis la laborkunsido de la Kongreso.

La komisiono, elektita dum la unua kunsido, prezentis projektojn de rezolucioj pri aferoj, tuŝitaj dum tiu kunsido.

Post pridiskuto la Kongreso aprobis la jenajn rezoluciojn laŭ la propono de la komisiono:

I. Eksciinte, ke en diversaj lokoj apartaj personoj, nerespondecantaj antaŭ la movado esperantista, senpripense iniciatis la organizadon de publikaj artistaj aranĝoj (ekz. koncertojn) kiuj estis propagandontaj Esperanton, sed — eble spite intencoj de la organizantoj — ofte nur malutilis al Esperanto, — la VII. Pollanda Kongreso de Esperanto vokas la lokajn Esperanto-grupojn, ke ili kontrolu tian artistan iniciaton kaj apelacias al personoj, organizantaj tiajn aranĝojn, ke ili antaŭe interkonsentadu pri la programo, partoprenantoj, organizaj detaloj ktp. kun la lokaj Esperantaj organizaĵoj.

II. La VII. Pollanda Kongreso de Esperanto opinias utila, ke

1. la aŭtoroj de Esperantaj verkoj kaj tradukantoj de verkoj Esperanten, komencu sian laboron interkonsente kun la lokaj Esperantaj societoj aŭ senpere kun PED;

2. lokaj Esp. societoj aprobu la iniciatitan eldonon de Esp. verkoj originalaj aŭ tradukitaj nur post detala esploro de lingva kaj tema flankoj kaj de ĝenerala utileco de la verko. Dezirinde estas laŭeble kaj laŭnecese demandi la opinion de Lingvokomitatanoj,

3. uzo de publikaj aŭ sociaj monrimedoj por Esp. eldonaĵoj devas okazi interkonsente kun lokaj Esp. societoj aŭ kun PED.

III. La VII. Pollanda Kongreso de Esperanto vokas PED kaj LKK, ke por la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio 1937 estu preparitaj por voĉdono proponoj pri internacia konferenco de registaroj, kiu aprobu „Internacian Lingvan Interkonsenton". Materialoj pri tiu demando, prilaboritaj de la centraj organoj de la internacia movado, estu dissenditaj antaŭe al la registaroj de ĉiuj ŝtatoj por ekinteresi ilin pri tiu iniciato.

IV. La VII. Pollanda Kongreso de Esperanto petas PED ricevi informon, kial Polujo sendis negativan respondon pri Esperanto, proponita kiel unu el lingvoj de scienca teknika vortaro. PED klarigu al la koncerna organizaĵo en Polujo, ke ĝia sinteno estis neĝusta kaj tuŝu tiun demandon en konforma maniero en la gazetaro.

* * *

La dua tago de la Kongreso komenciĝis per laborkunsido je 9-a horo matene.

La Kongreso elektis komitaton por okazigo de jubileo de la 25-jara Esperanta agado de meritplena prezidanto de PED prof. dro Odo Bujwid.

La Komitato konsistos el ĝesamideanoj: dir. Kostecki, dir. Tor, dro L. Rosenstock, prof. Hodakowski, dro Dreher kaj L. Kutscher (ĉiuj el Krakovo), red. J. Ŝapiro (Bialystok), dro J. Mędrkiewicz (Lublin), dro W. Róbin, Leo Belmont kaj H. Weinstein (Varsovio), dro I. Fels (Lwów), kapitano Silhan (prez. de UABO), dro Edm. Privat (Locarno), ĝen. Bastien (Parizo), pastro Cseh kaj s-ino Isbrücker (Hago), E. Archedeacon (Parizo), B. Long (Londono), Holger Hansen (Danujo), prof. dr. Canutto (Italujo), Baghy (Hungarujo), Lidja Zamenhof.

Longan diskuton elvokis la propono de Dro Dreher pri fikso de unujara laborplano por la Esperantaj grupoj en Polujo. La diskuton partoprenis multaj kongresanoj, kiuj i. a. postulis, ke la aŭtoro de la propono konigu pli detale la planon. Fine la proponinto modifis la proponon, limigante ĝin al la zorgo pri kiel eble plej multnombra partoprenontaro por la Jubilea Kongreso.

La Kongreso akceptis la jenan rezolucion tiurilatan:

„La VII. Pollanda Kongreso de Esperanto rekomendas al la pollanda Esperantistaro konkurse klopodi pri tio, ke al la Jubilea Universala Kongreso en Varsovio en la jaro 1937 estu sendataj kiel eblej multaj partoprenantoj el ĉiuj urboj. La plej bonaj rezultoj estos premiataj.

„La VII. Pollanda Kongreso de Espe-PED antaŭ la Viena Kongreso al ĉiuj membroj-grupoj de PED. La planon ellaboros Dro L. Dreher".

Krom tio laŭ proponò de s-ro Alfus estis akceptita la jena rezulucio:

„VII. Pollanda Kongreso de Esperanto petas Dron Dreher, ke li preparu unujaran laborplanon kaj prezentu ĝin al PED por realigo".

Varman intereson montris la Kongresanoj al la afero de pliampleksiĝo kaj plibeliĝo de „Pola Esperantisto", kiu ja estos organo de la Jubilea Kongreso. Kelkaj parolantoj deziris, ke PED efektivigu tiujn plibonigojn, sed ili ne montris la rimedojn, kiamaniere tio estas efektivigebla. La Kongreso, komprenante, ke nur per belaj vortoj kaj varmaj paroladoj la presisto ne estas pagebla, akceptis jenan rezolucion proponitan de s-ro Alfus:

„VII. Pollanda Kongreso de Esperanto alvokas al fondo de speciala „kapitalo de Pola Esperantisto", kiu garantius ĝian regulan aperigadon kaj ĝian plibonigon".

La Kongreso akceptis ankaŭ la jenan rezolucion, proponitan de la prez. Ŝapiro:

„La VII. Pollanda Kongreso de Esperanto rekomendas al PED pripensi la eblecon de denova eldonado de bulteno en Esperanto pri Polujo.

Tiu bulteno estu dissendata al ĉiuj landoj de la terglobo".

Kiam oni priparolis ambaŭ ĉi-suprajn gazetarajn demandojn, prof. Bujwid kaj red. Ŝapiro atentigis en siaj paroladoj pri la gravaj servoj, faritaj al nia movado de nia samideano red. Pisarski-Woydakowski, kiu tre fervore enmetas informojn pri Esperanto kaj ĝiaj progresoj en la bultenon de la oficiala pola telegrafagentejo (PAT). La Kongreso akceptis aklame la jenan rezolucion, proponitan de prof. dro Bujwid:

„La VII Pollanda Kongreso de Esperanto dankas al s-ro red. Pisarski pro lia laboro por Esperanto en P.A.T. kaj petas lin daŭrigi tiun laboron".

La diskuto pri gazetara demando estis finita per akcepto de jena rezolucio, proponita de s-ro Białoszewski:

„La Esperanto-grupoj kaj izolaj Esperantistoj informu ĉiam PED pri artikoloj malfavoraj al nia movado tuj post ilia apero en la gazetoj, por ke PED havu eblecon senprokraste interveni."

La Kongreso unuanime aprobis la proponon de f-ino Halina Weinstein pri fondo de Esperanto-Muzeo:

„La VII. Pollanda Kongreso de Esperanto esprimas la deziron, ke:

1) okaze de 50-a datreveno de la ekzistado de Esperanto kaj aranĝo de Jubilea Universala Kongreso Esperantista en Varsovio en la jaro 1937, estu fondita E s p e r a n t a M u z e o en Varsovio, la lulilo de nia lingvo, konservonta por la historio la memoraĵojn precipe pri la unua periodo de batalado por l' lingvo internacia Esperanto. Tiujn memoraĵojn posedas ankoraŭ Esperantistoj, precipe de maljuna generacio;

2) la biblioteko de UEA — se estos decidite, ke ĝi foriru el Ĝenevo — troviĝu ankaŭ en tiu Muzeo kaj estu la fundamento por ĝia biblioteko;

3) la familio Zamenhof estu petata donaci por la Muzeo memoraĵojn, librojn kaj aliajn materialojn laŭ la bontrovo de familianoj de la Majstro;

4) la gesamideanoj en la tuta mondo estu petataj oferi materialojn por la Muzeo."

## PRI LA SIDEJO DE UEA.

La Kongreso, diligente laborinta kaj priparolinta ĉiujn aferojn de la enlanda movado, interesiĝis ankaŭ pri la aferoj de la internacia movado. Pri la demando de transportigo de la sidejo de UEA estis akceptita jena rezolucio:

„La VII. Pollanda Kongreso de Esperanto kun maltrankvilo aŭdis pri la projekto forigi UEA el Ĝenevo kaj dispartigi ĝin.

Konsiderante, ke Ĝenevo estas centro de diversaj internaciaj movadoj kaj ke la ĉefsidejo de Universala Esperanto-Asocio devas esti en lando severe neŭtrala, la Kongreso esprimas la deziron, ke la sidejo de UEA restu plue en Ĝenevo."

Malgraŭ la granda fervoro, kun kiu la Kongreso laboris, estis vere neeble ĉion elĉerpi. Krom la cititaj rezolucioj pri plej diversaj aferoj, venis ankoraŭ aro da rezolucioj, kiujn prezentis Pola Esperanto-Asocio, filioj en Łódź kaj Lublin. Ĉar ankaŭ ili tuŝis tre gravajn demandojn, la Kongreso — ne povinte jam detale ilin pridiskuti — transdonis ilin al PED por pritrakto.

## FERMO DE LA KONGRESO.

Tiu laborplena kunsido estis la lasta ero de la oficiala parto de la Kongreso. Precize je 12-a horo tagmeze laŭprograme la Kongreso estis fermita.

La prezidanto Ŝapiro en sia ferma parolado akcentis la laboremon de la Kongreso, seriozecon kaj altan nivelon de la diskutoj, absolutan mankon de personaj momentoj, kiuj estas malbeno de multaj movadoj, dankis kore la organizantojn, multe klopodintajn por la sukcesigo de la Kongreso, kaj detiris al PED fruktoplenan laboradon kaj plensukcesan aranĝon — kun la loka Kongresa Komitato — de la Jubilea Kongreso Esperantista.

La Kongreso denove ovacias al la prezidanto de PED prof. Bujwid, kiu dankas al la kongresanoj pro alveno kaj diligenta laborado kaj al la prezidanto de la Kongreso red. Ŝapiro pro modela kaj energia gvidado de la Kongreso.

La kongresanoj pasigis ankoraŭ komunan tempon ĉe tagmanĝo, aranĝita por ili en la restoracio „Szarotka" kaj posttagmeze veturis al Sowiniec, kie estas ŝutata monteto honore al la Marŝalo Piłsudski.

KAJ NUN — LABORI.

La Kongreso montris, ke ĉie en Polujo agas kaj deziras disvastigi nian aferon fervoraj samideanoj. Ke ili, ofte baraktante malfacile por sia propra vivteno oferplene laboras por Esperanto.

La Kongreso donos al ĉiuj Esperanto-grupoj kaj izolaj Esperantistoj novajn fortojn por laborado kaj konvinkon, ke ilia penado ne estos senfrukta.

Jubilea Kongreso en Varsovio — jen estas la plej proksima celo de nia laborado. Por inde festi nian jubileon ni devas grandskale disvastigi nian lingvon en la tuta lando, fortigi P.E.D. per aliĝo al ĝi de ĉiuj Esperantaj grupoj kaj helpi al pliampleksigo de ĝia organo „Pola Esperantisto" per amasa abonado.

Ĉiu kunhelpu! Por prepari brilan jubileon necesas multe labori.

**WAŻNE DLA SZKÓŁ I SAMOUKÓW!**
**ZNIŻKA CENY.**

Już ukazało się II-gie wydanie aprobowanego przez Ministerstwo W. R. i O. P. podręcznika esperanckiego p. t. „LEKCJE JĘZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO" — w opracowaniu **prof. Sygnarskiego** z przedmową prof. uniw. **dra Bujwida.** Cena podręcznika. zupełnie zmienionego, znacznie rozszerzonego i zaopatrzonego w dwa słowniczki — tylko 1.60 zł., przesyłka 25 gr. Do nabycia w Administracji **„Pola Esperantisto"**, Kraków, Lubicz 34. (Konto PKO 406.660) lub w **„Naukowem Kole Esperanckiem"**, Bydgoszcz, plac Wolności 9. (Konto PKO 141.787).

DR. LEOPOLD DREHER

# PRI -ATA KAJ -ITA

En iu numero de P. E. lastfare mi venis al la konkludo, ke estis -ita povas esti uzata eĉ ne formante tempantaŭecon. Mi ne donis ekzemplojn, kiuj ilustrus mian konkludon.

Jen kelkaj ekzemploj:

En 1620 la ĉeĥa nacio **estis venkita** (ĉar tiujare okazis la memorinda batalo apud Bila Hora), la patriotoj **estis deprimitaj.**

Dro Zamenhof **estis** tre **emociita,** kiam li publikigis sian unuan broŝuron.

Kompreneble, ĉiuj ĉi verboj apartenas al la kategorio de verboj aktivaj (ne stataj, kiuj en sia **particip-pasiva** formo kun **„estis"** povas signi sole samtempecon resp. tempantaŭecon). La kaŭzo videblas el mia artikolo citita ĉi-supre: verboj, kiujn mi nomis aktivaj, estas momentaj pri sia agotempo, sed, kontraŭe, longedaŭraj, se temas pri la rezulto de ilia agado. Tiamaniere ili emas en sia formo particip-pasiv-perfekta ŝtoniĝi en **adjektivojn:** venkita estas ja pli-malpli malvenka, deprimita pli-malpli mishumora, emociita (aŭ: kortuŝata) estas egala al emocioplena. Kiam ni rakontas, ke Zamenhof estis en 1887 **emociita,** ni ne pensas pri la cirkonstancoj, inter kiuj tio okazis, speciale ne pri la temp-cirkonstancoj, sed ni pensas kaj demandas: **kia** estis Dro Z., eldonante sian unuan broŝuron, same ni demandas, **kia** estis la ĉeĥa nacio, **kiaj** estis la ĉeĥaj patriotoj.

Sekve, ni povas montri kiel **principon** de nia procedado, ke estis -ita ne formas tempantaŭecon, kiam ni povas fari al ni mem la demandon: **kia(j)** estis la subjekto de la propozicio, ne: kio okazis pri ĝi. Samtempe, ĉar koncerna participo similas al adjektivo, ni povas en tiaj kazoj aldoni al ĝi unu el la adverboj de l' grado: tre, iom, tute k. s. **ekz. Dro** Z. estis **tre** emociita, la ĉeĥa nacio estis

tute venkita, la patriotoj estis forte deprimitaj.

A contrario: En 1620 la ĉeĥa nacio „estis venkata" respondas al la demando: kio okazis en 1620 al la ĉeĥa nacio? Ĉi tie ni havas t. n. rakontadon de historiaj pasintaj aferoj, raportadon pri faktoj, responde al nia demando: kio okazis? kio fariĝis?

La supra problemo ŝajnas al mi nun klarigita tute sufiĉe. Mi transiras do al alia problemo pri -ata kaj -ita, nome al tiu pri estas -ata, resp. -ita.

Ŝajnas al mi: ĉi tiu problemo postulas eĉ pli grandan zorgon en la praktika uzado, ol estis -ata, -ita. Ĉar fin-fine kaj estis -ata kaj estis -ita esprimis la preteriton, sekve almenaŭ pri tio ne estas eraro, kiam iu intermiksas ilin.

Sed laŭ ofta uzado de la esperantistoj ne tre atentantaj la problemon, „estas -ata" restas ja prezenso, sed estas -ita ĉe ili ofte aperas kiel preteritaĵo; tre ofte ni legas en raportoj: S-ro Z. estas elektita kiel prezidanto, anst. estis elektata. Komp. la komencon de la artikolo, laŭ kiu en raportoj pri faktoj, okazaĵoj kaj aliaj pasintaj fariĝoj al la demando:

kio okazis pri...?

ni respondas: ĝi estis -ata,
dum al la demando

kia estis...

ni respondas: ĝi estis -ita.

Sed estas -ita neniam kaj neniel povos respondi ol demando: kio okazis, sed nur al la demando:

kia estas

same kiel estis -ita respondas al la demando:

kio estis.*)

Neniel „estas" povas montri ion alian ol prezenson, same kiel „estis" povas montri nur preteriton, kaj „estos" sole kaj nure futuron.

Tial do estas -ita povas nur esprimi prezenson, kiu respondas al la demando: kia estas? Konkludo: Analoge al tio, kion ni legis pri estis -ata (-ita), ni devas diri, ke estas -ata respondas al la demando:

Kio okazas pri...?

kaj estas -ita — al la demando:

kia estas...?

---

*) resp. kio okazis antaŭ ol okazis...

Ekzemploj: La malliberulo, kiu provis forkuri estis kaptata kaj rekondukata en la arestejon. Nun li bedaŭras sian faron, ĉar li estas ree malliberigita, krome senigita de la plej kara bono: la laboro, kiu estis donata al li dum li kondutis konforme al la leĝoj de l' pundomo. Li estis tiel ĉagrenita post tiu missukcesa provo de forkuro, ke eĉ tiu laborsenigo, en la unua tempo, ne estis sentata de li kiel puno; tiel komplete li estis sensentigita.

La historio pri Z. estas prilaborata de la fama verkisto A. por sonfilmo tit.: La missorto de Z.

Kvankam nekompleta, la supra studo povas taŭge servi kiel gvidlinio por uzantoj.

## *AMARAJ PRIKONGRESAJ PENSEROJ.*

1). La organizantoj de niaj universalaj kongresoj malatentas ofte la fakton, ke la kongresoj ne estas destinitaj nur por turistoj. Troviĝas inter la kongresanoj sufiĉe multenombra aro da seriozaj esperantistoj, kiuj venas en la kongresurbon antaŭ ĉio por partopreni en la laborkunsidoj kaj sciiĝi pri la progresoj de nia afero dum la pasinta unujara periodo. La organiza komitato ne malŝatu tiujn entuziasmulojn, kaj aranĝu la kongresan programon tiamaniere, ke la ideuloj havu sufiĉe da okazo por kontentigi siajn aspirojn kaj laboremon.

2). Niaj kongresoj havas sendube interalie ankaŭ propagandajn celojn. Sed neĝuste procedas tiuj, kiuj organizas la kongreson antaŭ ĉio tiucele por propagandi inter la partoprenantoj la naturbelaĵojn kaj kulturaranĝojn de la kongresa lando. Inverse niaj kongresoj devas servi al la organiza komitato kiel bona okazo por propagandi kaj popularigi nian movadon en la kongresaj urbo kaj lando, ĉar „ne la nazo estas destinita por tabakujo", sed kontraŭe...

3). En ĉiuj rilatoj validas absolute kaj senescepte la principo „prior tempore, potior iure". Tiu principo signifas, ke ju pli frue iu akiris ian rajton, des pli

privilegiita estas lia rajto. Koncernigante tiun maksimon al la teatraj prezentadoj, jam tradicie arangataj dum niaj universalaj kongresoj, ni prave supozas, ke ju pli frue iu aliĝis al la kongreso, des pli bonan lokon en la teatro rezervas al li la organiza komitato. Sed ni nur tiel supozas, ĉar okazis antaŭ nelonge tia kongreso, kies organizintoj havigis al multaj „lastmomentulo;" la plej bonajn sidlokojn en la teatro, dum la frualiĝintoj devis kontentiĝi, kvazaŭ „pro puno", per malpli bonaj lokoj.

4). Teatraĵo ludata dum la universala kongreso havas festan karakteron, ĉar la esperantistaro nur unu fojon en la jaro havas okazon ĉeesti teatran prezentadon, aranĝitan de profesiaj, plejgrandparte, unuarangaj aktoroj. Valora pentraĵo devas havi konforman kadron. La samo koncernas la teatraĵon. Ĉar ĝi estas por la kongresanaro vera solenaĵo, ĝi devas okazi en bela pompa salono. Kial mi mencias tion, kio ja ŝajnas esti tiel memkomprenebla? Ĉar okazis tia kongreso, kies organiza komitato elektis por la solena prezentado la plej primitivan, la plej modestan kaj la plej malmodernan teatron, kvankam la koncerna kongresurbo posedas multajn belegajn kaj lukse aranĝitajn teatrajn salonojn.

5). La internacia balo estas ĉiam unu el la plej allogaj distraĵoj de niaj universalaj kongresoj. Se la organiza komitato nepre volas prezenti al la balgastoj la karakterizajn naciajn dancojn de la kongreslando, ĝi konfidu tiun ĉi taskon al bone preparita trupo da lertaj gedancistoj, ĉar diletantoj scipovas danci nur... diletante.

Se la organizantoj de l' kongreso opinias necesa gajigi la balgastojn per kantoj, ili observu severe jenan regulon ĉe la dungelekto de la kantistino: Ŝia aĝo ne superu 70 jarojn....

**Napoleono.**

## PODZWONNE

Generale! Pochłonęło Cię morze. Morze, które ukochałeś. Ty, kawalerzysta, Ty, wielki i rozumny synu Polski. Zrozumiałeś, że przyszła obronność Polski na lancy i szabli ułańskiej wyłącznie nie może się wspierać. Że mocarstwowość Polski o brzeg morski musi całą siłą się oprzeć. Od tego zależy jej moc obronna od tego zależy jej potęga gospodarcza. I ostatnie swe lata poświęciłeś pracy nad rozbudową Ligi Morskiej i Kolonialnej. Z tego małego pasma brzegowego chciałeś przerzucić w świat daleki, kraje wszystkich narodów owoce polskiej pracy, kwiaty polskiej duszy. I dlatego jesteś nam w tej pracy duchowo bliski, bo w tej ekspansji narodu i państwa polskiego bierzemy skromny, ale żywy udział — dając narodom świata, co im tak potrzebne i pożyteczne — pomocniczy język światowy i honor własnego języka, który nie będzie musiał w przyszłości żyć w cieniu, narzuconym przez języki innych, często wrogich, ale dominujących narodów.

Cześć Twoim prochom!

**Polskie Towarzystwo Esperantystów.**

Lublin, dnia 18 lipca 1936 r.

## FUNEBRA REMEMORO

Generalo! La maro Vin englutis. La maro, kiun Vi arde amis. Vi, kavaleriisto. Vi, granda kaj saĝa filo de Polujo, ekkomprenis, ke la estonta defendebleco de Polujo ne povas apogi sin sole sur ulanaj lanco kaj sabro. Ke la imperia potenco de Polujo devas tutforte fosi fundamentojn sur la marbordo. De tio dependas ĝia defenda kapableco, de tio dependas ĝia ekonomia potenco. Kaj jen Viajn lastajn vivjarojn Vi oferis al laboro pri progresigo de Mara kaj Kolonia Ligo. De tiu malvasta bordo-strio Vi volis transĵeti en la malproksiman mondon, en la landojn de ĉiuj popoloj la fruktojn de pola laboro, la florojn de pola menso. Kaj en tiu laboro Vi estas al ni tial spirite proksima, ĉar tiun ĉi ekspansion de l' pola nacio kaj ŝtato ni akcelas per nia modesta sed vigla partopreno — donante al ĉiuj popoloj de l' mondo tion, kio estas al ili tiel bezona kaj utila — la helpan mondlingvon kaj honoron de propra lingvo, kiu ne estos devigita vivi estonte en ombro, altrudita de la lingvoj de aliaj, ofte malamikaj, sed superregantaj nacioj. Ni honoras Viajn cindrojn.

**Pola Esperantista Societo.**

Lublin, la 18. de julio 1935.

# ESPERANTO KAJ STENOGRAFIO

Por multaj homoj Esperanto ne estas simpla lingvo; ĝi estas ankaŭ nobla idealo. Same okazas sur la stenografa kampo: la konata sistemo ne estas nur rapida kaj profesia skribo, ĝi prezentas alian intereson kaj fariĝas vera idealo por siaj adeptoj.

Sekve, kiu estas samtempe stenografiisto kaj Esperantisto, tiu estas ne nur vere praktika homo, sed, se li ne konsideras la aferon laŭ ĝia nura profitodona uzebleco. li tuj havas duoblan idealon, kiun li deziras unuigi.

Kiam Esperanto disvastiĝis, ĉiu eksentis la necesecon uzi ĝin same, kiel ĉiujn aliajn lingvojn, kaj, en 1896. „Lingvo Internacia" publikigis artikolon pri Esperanto kaj Stenografio, en kiu oni konsideris precipe la sistemojn Duployé kaj Gabelsberger.

Kelkaj gazetoj de la Duployé'a skolo publikigis regulan rubrikon pri Esperanto kaj eĉ instruis nian lingvon, aŭ studis la skribadon de tiu lingvo per tiu tiel simpla sistemo. Sed tio restis flanka kaj izola propagando. Nur en 1899, en Stockholm, aperis la unua lernolibro, verkita de P. Ahlberg, laŭ la sistemo de d-ro Julius Brauns.

La adeptoj de Esperanta stenografio dividiĝas en tri grupojn: la unuaj konsideras, ke devas esti nur unu skribo, same kiel nur unu lingvo estas ebla. Aliaj opinias, ke estonta skribo ne povos taŭgi nur por Esperanto; ĝi devas esti tuj aplikebla al kiel eble plej multaj lingvoj. La plimulto, kiu profunde studis la aferon, pli ŝatis alkonformigi bonegan sistemon al la internacia lingvo, kiel ĝi jam estis alkonformigita al pli aŭ malpli multaj aliaj lingvoj.

Inter la sistemoj verkitaj nur por Esperanto estas tiuj de: Barit, Brabbée, De Vries, Dyba, Jakab, Scheller.

Inter la sistemoj, verkitaj samtempe por Esperanto kaj multaj lingvoj, estas tiuj de:

De Maertelaere, Sobczyński, Sprotte.

Inter la sistemoj alfaritaj por Esperanto estas tiuj de:

Aimé-Paris, Arends. Brauns, Duployé, Gabelsberger, Gregg, Groote, Pitman, Prévost-Delaunay, Radnai, Roller, Scheithauer, Stolze-Schrey, Von Kunowski, kaj la Unueca Germana.

Estas rimarkinde, ke la sistemoj verkitaj aŭ nur por Esperanto, aŭ por kelkaj lingvoj ne povis akiri adeptaron; nur la alfaroj de malnovaj sistemoj pli malpli disvastiĝis en la Esperantistaro. Jen ili laŭ la alfabeta ordo. Inter krampoj ni mencias la alfarinton: Aimé-Paris (Lefebvre), Duployé (Flageul), Gabelsberger (Christoffel), Groote (Cogen), Pitman (Butler), Prévost-Delaunay (diversaj alfarintoj), Radnai (Kökény), Stolze-Schrey (Kreuz), Von Kunowski (mem).

Neniu miros pri tiu fakto, se ni diros, ke la sistemoj nun uzataj triumfis inter multaj centoj da sistemoj publikigitaj. Se ili postrestis, tio devenas de ilia merito. Ĉu ni devus proklami, ke nova sistemo pli valoras ol ĉiuj tiuj aliaj ĉar ĝi estas verkita — ofte de ne stenografiisto — por nia kara lingvo?

Aliparte, se ni akceptus iun el tiuj novaj sistemoj, ni devus tuj alkonformigi ĝin al ĉiuj vivantaj... kaj mortintaj lingvoj, ĉar ĉiuj devas esti stenografeblaj per sama sistemo.

Fine, ĉu iu povas malebligi, ke la multaj Esperantistoj, kiuj jam uzas stenografion, plue uzu kaj propagandu tiun saman sistemon, kiu donas al ili plenan kontentigon? Tute ne!

Certe, gravaj motivoj instigus nin deziri, ke nur unu skribo estu uzata, kiel ni dezirus havi nur unu helpan lingvon, sed se ni konsideras la ĉi suprajn argumentojn, al kiuj ni povus aldoni aliajn ne malpli gravajn, ni devas konfesi ke, se iam la afero fariĝos ebla, ni ne povas jam nun antaŭvidi tiun tempon, kaj sekve, anstataŭ atendi favorajn cirkonstancojn en facila mallaboreco, pli bone estas stenografi nian lingvon per nun ekzistanta bonega sistemo, kaj tiamaniere servi Esperanton.

**Rimarko.** Pri ĉio, kio koncernas la aferojn de esp. stenografio turnu vin al delegito de S. I. T. (Stenografia Instituto Tutmonda) en Polujo: poczta Dąbrowa k/Grodna, st. Kamienna - Nowa.

**Wł. Michałowski.**

Acidakvoj kalcia-feraj en tipo Spaa troviĝas krom tiuj en Krynica en tuta valo de Poprad, kaj ĉi tie oni devas citi: Muszyna, Żegiestów, Łomnica, Piwniczna, Głębokie ktp. Tiuj Podhalaj fontlokoj kun acidaj akvoj, al kiuj oni devas enkalkuli ankaŭ fontojn en Wysowa, aperas simpladire en grandega kvanto sur malgranda landparto ekde rivero Dunajec ĝis rivereto Ropa en distrikto Gorlice'a.

Fontojn sulfura-kalciajn en tipo de tiuj en Aachen, Aix les Bains ni posedas en Lubień apud Lwów, en Niemirów, Horyniec kaj Krzeszowice apud Kraków, sed la polaj sulfurfontoj apartenas al la plej fortaj en Eŭropo. En Burkut, pri kiu mi jam menciis en komenco, kiel pri kuracloko, situanta plej sude inter polaj kuraclokoj, ŝprucas bonega kuraca acidakvo kaj ĝi estas en alpa klimato, ĉar Burkut kuŝas en alteco de 1014 m super la marnivelo; ĝi estas belege situita, inter senmezuraj piceaj arbaroj, apud Nigra Ĉeremoŝ-rivero, ĉe piedajo de Ĉarnohora, sur sunplena interarbara kalveĵo, kovrita kontraŭ ventoj. Nekutime bonaj ecoj de akvoj en Burkut — kvankam la aranĝoj de la kuracloko estis forte detruitaj dum la mondmilito — faras, ke Burkut estas tre ŝatata kaj plej alte situita pola fontloko.

Burkut posedas konkuranton en apud—Zakopane'a Jaszczurówka, kiu kuŝas ĉe vojo al la plej bela lago de Tatroj — Morskie Oko (Mar-okulo). Jaszczurówka estas situita en alteco de 908—1042 m kaj tie eliĝas ununura natura varmfonto, t. e. fonto mineralakva, posedanta konstantan temperaturon de 21 Celsius-gradoj. Tiu fonto estas kaptita per banbaseno. Fortegan impreson faras rigardo de la fontloko al Tatroj kovritaj de neĝa kurteno. Komence de jaro 1936. Zakopane mem, kiel ĉefa loko turismo-kuraca en Tatroj, ricevis grandan allogajon en formo de unua kablo-fervojeto, kondukanta de Kuźnice apud Jaszczurówka sur montsupron, nomatan Kasprowy Wierch, 1988 m en Tatroj, de kie etendiĝas unu el plej grandiozaj montar-panoramoj.

DR. ADAM GADOMSKI.

# KURIOZAĴOJ DE KURACAKVOJ EN POLLANDO.

Pripensante tiun problemon, oni devas veni al ĝi laŭ geografia vidpunkto, ĉar ekz. unu rigardo sur terkarton de Pollando, kie estus signitaj ĉiuj kuraclokoj kaj kuracfontoj permesas al ni orientiĝi, ke ili estas grupigitaj plejparte en suda parto de Pollando (antaŭ ĉio en Malgrand-Polujo) en Silezio, en regionoj de Kielce kaj Lublin, lokiĝinte zonforme tra meza kaj okcidenta Pollando (provincoj Poznana — Pomeranio ĝis la Pola Maro). Krome de tiu kompakta zono sudokcidenta, komencante de Varŝavo laŭlonge de fervoja linio al Vilno videblas ankaŭ, malforte reprezentata, vilna zono (Druskienniki-Troki). En sud-orienta zono limloko estas Burkut en Huculujo, samtempe pleje suden elŝovita fontkuracloko proksime al fontoj de rivero Ĉeremoŝ, situita en latitudo de Budapest kaj Wien, kion oni devas speciale substreki, ke ni havas kuraclokojn kaj klimatsanigejojn relative sufiĉe malproksime sude situitajn, kompare al tutaĵo de polaj teroj kun prefere norda situo). Lastlima loĝloko en oriento estas Okopy Świętej Trójcy, (kiun nomon oni povus facile traduki per „Tendaro de Sankta Triunuo"), oriente de Zaleszczyki situita, kaj tiuj lokoj distingiĝas per varma klimato, riverbanoj kaj sudaj fruktoj, kie oni povas bonege kuraci sin per intensa suno, ne serĉante alilandan sudon. Ekstreme okcidentaj estas kuraclokoj en Silezio, provinco Poznana kaj Pomeranio kun bonega someruma-kuracloka strando de Balta maro. Sed tiel nomata orienta limteritorio tute malhavas kuraclokojn ne tial, ke tie ne estas kuracfontoj, sed tial, ĉar tiuj teritorioj estas kovritaj de grandaj arbaroj (Białowieża) kaj grandegaj marĉejoj kaj lagoj (Polesie estas la plej granda en Eŭropo teritorio de marĉejoj) kaj ĉirkaŭaĵoj de Bracław kaj Wilno kun grandegaj lagoj — inter ili lago Narocz, posedanta jam preskaŭ maran karakteron — posedas tute alian karakteron de

ĝeologi-suprajaj kondiĉoj. Pro tio, ke la kuracfontoj aperas en la jam antaŭe nomitaj partoj de Pollando en grandega riĉeco, oni ne serĉas ilin en orientaj partoj de la lando. La jam citita bonega klimato de Podolio (Zaleszczyki) posedas ankaŭ alian kompletiĝon en formo de bonega klimato altmontara de montaraj klimatlokoj, komencante de la jam menciita Burkut oriente ĝis Wisła ĉe fontoj de Vistulo okcidente. En tiu montara zono, posedanta eŭropan signifon, oni devas substreki rolon de Tatroj kun Zakopane kaj varmfontoj en Jaszczurówka ĉefloke kaj alpa karaktero de Tatroj, kies klimato estas eminente suna kaj relative seka en vintro. Ĝi estas nekutima bona eco de tiuj ĉirkaŭaĵoj kompare precipe al stacioj klimataj de okcidenta Eŭropo, kiuj krom Svisujo distingiĝas per vintro nebula kaj malseka.

Transirante post tiu enkonduko geografia-klimata al la kuriozaĵoj mem de kuracakvoj en Pollando, oni devas diri, ke ni havas antaŭ ĉio grandan abundon da salakvoj por trinko, bano kaj inhalo. Tiuj troviĝas en: Delatyn, Truskawiec, Rymanów, Iwonicz, Rabka, Solec, Busk, Jastrzębie, Druskienniki, Ciechocinek, Inowrocław. Inter kuriozaĵoj de kuracakvoj, inter tiuj salaj, oni devas priskribi sekvajn: Ciechocinek posedas ĉirkaŭ 14 abundajn fontojn kaj post profunda borado ricevis valoregan varmakvon, t. e. naturan varman salakvon kaj grandegan artefaritan basenon preskaŭ lagon kun strando kaj varmaj kvazaŭ maraj, grandiozaj kuracbanoj. La akvoj de Ciechocinek posedas diversegan signifon en kuracado, kaj similan signifon posedas akvoj salaj de Inowrocław, kiu estas krome konata pro tiea aperado de salo en natura stato kaj ekspluatata de salminejo. Kaj Truskawiec, kiu situas en petrolbaseno de mezaj Karpatoj, posedas krom salaj kaj sulfuraj akvoj faman „Naftusia'n", forte uriniĝantan kaj unikan en urinorganaj suferoj. Ĝi ankaŭ posedas artefaritan banbasenon en Pomiarki, similan al la baseno en Ciechocinek.

Rymanów inter multaj aliaj posedas akvon de Titus, kaj proksime situanta Iwonicz akvon de Adolf; tiujn akvojn mi ne substrekas kiel kuriozaĵojn, sed mi substrekas nur la



fakton, ke ili posedas nomojn de du decidaj kontraŭuloj de la juda nacio, nome de imperiestro Titus, konkerinto de Jerozolimo kaj de kanceliero de germana ŝtato Adolf Hitler, sed mi samtempe atentigas, ke tiuj nomoj havas nenian kaŭzan ligilon kun ambaŭ ŝtatviroj, kaj la fonto de Adolf en Iwonicz posedis sian nomon, antaŭ ol kanceliero Hitler enmarŝis sur historian arenon.

Se temas pri aliaj grupoj de kuracakvoj, ni vere ne posedas akvojn alkale-sale-glauberajn, kiel Karlove Vary (Karlsbad), sed la uzado de akvo el fonto Zuber en Krynica kun salo el Morszyn povas ĝin certagrade anstataŭi. Akvo Zuber el Krynica posedas simpladire esceptan signifon, kaj tiu akvo per sia konsistaĵo fundamente diferencas de aliaj akvoj el Krynica, ĉar ĝia plej esenca kombinaĵo estas sodo. Dume tiun Zuberon oni trinkas en stato natura aŭ iom varmigita, ĉar provoj ricevi nature varman akvon, malgraŭ profunda borado, atinganta preskaŭ 1000 metrojn ne donis pozitivan rezulton. Sed dank' al tiuj profundaj boradoj en ŝaktoj de Zuber oni ricevis sekan gason en rigida stato, kiu estas kuriozaĵo simpladire laŭ tuteŭropa mezuro kaj dank' al eliĝado de tiu gaso lastatempe oni instalis en Krynica sekajn banojn natur-gasajn. Sed la ceteraj akvoj en Krynica apartenas en grandega plimulto al grupo de acidakvoj kalcia-feraj: haviĝas ilin multaj fontoj jam delonge konataj (Kryniczanka, Słotwinka, Karol, Jan, Józef kaj multe da novaj akiritaj per lastatempaj boradoj).

La jam menciita fonto en Morszyn, kiu kune kun Zuber el Krynica anstataŭas Karlsbadon, estas fontloko en ĉe-Karpata regiono kun ununuraj en Pollando fontoj de amaraj akvoj similaj en efiko al akvoj de Karlsbad. Akvojn alkale-sale-glauberajn laŭ tipo Kissingen ni posedas en Rymanów kaj Szczawnica. Szczawnica, situita ĉe elirloko de superbelega montobreĉo de Dunajec-rivero en Pieniny-montaro, posedas konatajn laŭ sia kuraca agado fontojn Józefina, Magdalena, Stefan ktp. Precipe en malsanoj de spirorganoj: tiuj akvoj estas en tipo de mondfamaj akvoj el Ems kaj Selters.

# 25-JARA PORESPERANTA AGADO DE S-RO SAPIRO

Nia amiko, Jakobo Ŝapiro, festas sian 25-jaran esperantistiĝon...

Kiam mi eksciis pri tio, mi ekmalĝajis, feliĉe ke longaj vojaĝoj kaj multa okupo, forigis tiun amaran penson...

Imagu do, mi, kiu pensis, ke mia amiko estas juna dando kaj, rigardante lin, ĉiam pensis al mia junforto, jen subite per drataj (ne drastaj) fadenoj, per radio kaj esperantaj gazetoj mi ekscíis, ke mia amiko maljuniĝis, ke Joŝo baldaŭ ĉesos babili ne pri sia sindonemo al esperanto, sed pri knabinoj, pri belaj, dolĉaj knabinoj, kiuj kelkafoje kongresas, pri amo, forta amo, ne al esperanto, sed al la ina sekso...

Tion ĉi mi eksciis unu belan tagon kaj mi malĝajis.

* * *

Estas malbona afero, sed feliĉe ne tute.

Mi pensas, ke mia amiko ekfestis la 25-jaran esperantistiĝon, kuraĝis publike konfesi, ke li maljuniĝis, ekbabilis pri tiu afero, nur por esti bona kaj fidela amiko, por amike, ame transdoni al mi la belajn kaj varmajn korojn de la knabinoj...

* * *

Mi do finfine devas ĝoji. Ĉar maljuniĝinte sin per la surŝarĝo de 25-jara esperantistiĝo — tempo sufiĉa eĉ ĉe normalulo por fine edziĝi kaj havi infanojn, — Joŝo transdonas al mi herede ĉiujn belulinojn, kiuj postkuris lin dumkongrese.

* * *

Mi ĝojas do fine, ke per Joŝa maljuniĝa festo, mi subite rejuniĝis kaj povos denove pli fervore okupiĝi pri belecoj kaj belaĵoj, kiuj estas multe pli interesaj ol eĉ la proza propagando de esperanto.

* * *

Decas fine ion deziri al jubilanto: ke via posta 25-jara poresperanta agado pasu en silento, por ke la tiamaj esperantistinoj ne konstatu, ke vi ne plu estas la gaja junulo kaj sincera kamarado de antaŭ — jaroj...

**S. Grenkamp**

# PRI „RIMPORTRETOJ"

**„Galerio de Esperantaj Steloj" de Kalocsay.**

Eble „Pola Esperantisto" skribis jam pri tiu ĉarma libreto. Eble mi tralasis recenzon. Se jes, pardonu. Sed tiu ĉi eta libro nur nune troviĝis en miaj manoj; kaj ravita per talento de jam tre konata aŭtoro, sed nove brilanta ĉi tie, mi pensas, ke la legantaro ne koleros je mi pro nuna memorigo.

Verŝajne tutmonda literaturo ne havas similan libreton. Esperantujo rajtas fieri pri ĝi. „En rondelformo facilkanta Portreto'n pentras la aŭtor'. Jen — por honor' kaj por memor' — Galerieto Esperanta". Pli ol kvindek potretojn de konataj diversnaciaj Esperantistoj donas al ni Kalocsay — ĉiun pentrante trafe kaj sprite en dek versoj, ĉar en lerta malfacila formo de „rondelo" ĉiam tri versoj el dektri estas ripeto de l' uzitaj en komenco. Severa ordo en lokiĝo de rimoj, en kiuj ripetataj estas nur du fundamenta' sonoj, ne malhelpas la aŭtoron doni impresplenan, precizan, tre amuzan, iamfoje satiran, sen guto de malico, portreton de ĉiu eminenta esperantisto en miniaturo (ĉiu de li pli proksime konata). Kompreneble ĉe ĉiu rondelo estas la fotografaĵo de prikantita persono. La libreto estas tre bele eldonita de „Literatura Mondo" (Budapest). Oni komprenas, ke eldonita estis jam dua milo.

En rondelo skribis „inviton" F. Szilagyi sur unua paĝo kaj prave substrekas „diablan ĉarmon, vervan vibron, jonglan manon" de Kolomano Kalocsay kaj invitas la legantojn, ke ili eltrinku tiun ĉi likvoron dolĉan kaj ĉampanon" de la poezio. En rondeloj sur lastaj paĝoj L. Totsche nomas la aŭtoron prave: „unika hom', de versoj majstra suveren", kaj justa kaj fama Waringhien, donas al li meritan titolon: „mondvoĉa bardo".

Sed pli bone donu ni, por pruvi nian opinion, la portretojn — ni elektas portretojn de Bujwid kaj Kabe, niaj polaj eminentuloj. Homagiante al nia ŝatinda kaj amata profesoro **Bujwid** kaj al fama — nune malproksima de ni — granda stilisto esperanta **Kabe**, ni donas, al polaj legantoj niajn laŭeble fidelajn tradukojn de ĉi tiuj du versaĵoj en sama formo de rondelo.

**Bujwid** — kun monde fama scio.
Prelegas kaj eksperimentas.
Ke por ni agas li kaj sentas,
Fieras rajte Polonio.

Nin pri l' bakteriologio
Li en libreto orientas.
**Bujwid** — kun monde fama scio.
Prelegas kaj eksperimentas.

Per saĝo kaj reputacio
Per saĝo kaj reputacio
Ho, kiam seron li inventas
De l' kontraŭverda bakterio.

**Bujwid** — kun monde fama scio.

Ho, **Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,**
Droninte vive en la morto,
Kia mister'- malica forto
Vin povis de ni preni rabe?

Ni lernis de vi lernant-knabe
Kuiri en la stilretorto
Ho, **Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,**
Droninta vive en la morto!

Kaj nun ni miras gape, strabe,
Pri via karier-aborto,
Al vi esperanta vorto
Nun eble sonas ĵam arabe...

Ho, **Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,**

**BUJWID.**

**Bujwida** skroń otacza chwała,
Przemawia, eksperymentuje...
Że dla nas działa, z nami czuje,
Dumną jest słusznie Polska cała.

Przeciw bakteriom gniewem pała
I z wiedzy oręż ·na nie kuje. —
**Bujwida** skroń otacza chwała;
Przemawia, eksperymentuje...

Jego to mądrość, sława stała
Cały ruch polski cementuje...
Czy znajdzie **serum,** co się struje,
Przeciwzielona ćma zuchwała?...

**Bujwida** skroń otacza chwała. —

**KABE.**

O, **Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,**
Coś żywcem od nas uszedł w cienie...
Jakichś złośliwych sił natchnienie
Tajnie nas z skarbów Twoich grabi?

Jako uczniowie Twoi słabi
Braliśmy z Ciebie mocy drgnienie...
O, **Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,**
Coś żywcem od nas uszedł w cienie...

Jeszcze Twój styl nas nęci, wabi,
Zerwaniem budzi w nas zdziwienie,
A może Esperanta brzmienie
Dźwięczy Ci dziś, jak głos z Arabii?

O, **Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,**

**L. Belmont.**

## *KIEL ESTIS EN KRAKÓW DUM NIA VII-a KONGRESO*

Mi respondas per unu vorto: bonege. La kongreso mem estis sub signo de laboro por Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en 1937, la urbo ĉarma kaj alloga, la krakovaj gesamideanoj bonkoraj kaj treege afablaj.

Kun ĝojo mi renkontis tie N a p o l e o n o n (kiu ne memoras lin el VIII. Universala Kongreso de Esperanto en Kraków!), kun plezuro mi promenis kun s-ano Kutscher en belega Botanika Ĝardeno, kun granda intereso mi vagis akompanate de s-ano Tydor en la malnova hebrea kvartalo Kazimierz, kun..., nu neeble ke mi rakontu pri ĉio, ĉar mi bezonus almenaŭ tri paĝojn en Pola Esperantisto (la Redakcio certe ne disponigos al mi tiom multe da loko). Mi nur menciu ankoraŭ: estis gaje kaj bonhumore „Sub la kruceto"!!

Tamen pri du interesaj momentoj mi volas rakonti al vi pli detale.

Unufoje mi sidis sur benko antaŭ kafejo „Esplanade", kie mi fiksis rendevuon kun tre ŝatata s-anino Neuberg, kaj atendis ŝian alvenon. Dume proksimiĝis al la benko unu sufiĉe alta, maljuna sinjoro kun longaj blankaj haroj, blanka longa barbo kaj kun malmola ĉapelo sur la kapo. Frapis min lia vizaĝo kaj mi fiksis la okulojn en ĝi. Subite li min demandas:

— Kial vi tiel obstine alrigardas min?

— Ĉar via vizaĝo interesas min. Estas en ĝi io konata al mi, sed kio, tion mi ne povas rememori. Vi plaĉas al mi.

Li laŭte ekridis:

— Nu, ĉu vi ne scias, kiu mi estas?

— Ne, mi vin tute ne konas, mi estas el Varsovio.

Ĉu vi estis ĉi tie en la preĝejo de Franciskanoj?

— Jes, mi vizitis tiun ĉi preĝejon, en ĝi troviĝas tre interesaj kaj belegaj vitraĵoj de S-taj Cecilio kaj Francisko, kaj de Dio-Patro, pentritaj de Wyspiański.

— Nu, nu, jen. Sciu, ke ĝuste mi servis al Wyspiański kiel modelo por la vitraĵo de Dio-Patro. Mi estas Rogalski, mi loĝas ĉe str. Jagiellońska 8. Ĉu vi estas pentristino?

— Ne, mi laboras sur Esperanto-kampo kaj de tempo al tempo mi skribas al esperantaj gazetoj.

— Esperanto, Esperanto!... mi aŭdis ĝi, sed mi ne estas ĝia amiko.

Mi komencis al li rakonti iom pri nia movado, pri pola literaturo aperanta en Esperanto, pri **Sinjoro Tadeo,** kies majstra traduko de Grabowski disiris multkvante en la tuta terglobo... S-ro Rogalski atente aŭskultis mian rakonton, malfermiĝis antaŭ li alia nekonata mondo.

Kelkajn tagojn poste (mi restis en Kraków 12 tagojn) venis al parencino, kie mi loĝis, konata krakova pentristino Maria Niedzielska. Post mallonga, sed interesa parolo kun ŝi, mi demandis, ĉu estus eble, ke mi vizitu ŝian laborejon. Kun eksterordinara afableco ŝi invitis min al si. Senpacience mi atendis la fiksitan tagon. Fine: mi prenas fiakron kaj diras ĝojvoĉe la adreson: str. Szpitalna Nr. 17, kvara etaĝo" (mi ja terure ne ŝatas etaĝojn). La veturigisto serioze respondis: „Mi povas vin veturigi nur ĝis la pordego." — „Bedaŭrinde — mi ekĝemis — ĉar en Varsovio oni veturigas pasaĝerojn eĉ al etaĝoj."

Nu, antaŭen. Ni traveturas kelkajn stratojn kaj fine ni haltas antaŭ la domo, kie loĝas s-ino Niedzielska. Vigle mi trasaltis la unuan etaĝon (ne ridu pri tiu ĉi mia salto!), la duan mi trairis iom pli malrapide, la trian — ankoraŭ pli malrapide, kaj la kvaran — tiel malrapidpaŝe, kiel dum promeno en Botanika Ĝardeno kun s-ano Kutscher.

Jes, ju pli alten, des pli malfacile...

Fine mi sonorigis, malfermis la pordon s-ino Niedzielska mem. Kun afableco ŝi invitis min al saloneto, kie ŝi loĝas. Kun intereso mi rigardis pendantajn sur la muro diversajn bildojn. Je mia peto ŝi rakontis al mi iom pri si mem. Do mi eksciis, ke ŝi finis Akademion de Belartoj en Kraków, studis poste en München kaj en Parizo en Akademio Colarossi, kie ŝi ricevis bronzan medalon por portreto-studo, gvidis dum multaj jaroj en Kraków Lernejon de Pentrarto por virinoj; ke el tiu ĉi Lernejo eliris tiaj pentristinoj kiel Zofia Stryjeńska, Maria Berezowska, Maria Gutkowska, Alice Marcoussis k. a. Post kiam en la Akademio de Belartoj virinoj akiris la rajton lerni, ŝi fermis sian lernejon, kaj nun ŝi multon pentras kaj gvidas kursojn por infanoj kaj junularo. Ĉi tie, en ŝia saloneto, mi trovis kvar bildojn de Zofia Stryjeńska, kiuj prezentas la fabelon „Pri reĝidino raneto". La dankema lernantino, fininte la lernejon, pentris ilin kaj donacis al la kara instruistino.

Post ioma babilado ni transiris en laborejon, kaj jen mi ekvidis belajn bildojn, pentritajn de la mastrino mem. Jen ravas la okulojn „Interno de kampara preĝejo", jen „Malnova silezia preĝejeto", jen „Lago". En unu angulo mi vidas „Rozojn", — mi alproksimiĝis por ilin flari, ili aspektas kvazaŭ vivaj.

Fine s-ino Niedzielska modeste rakontis al mi, ke ŝi pentris bildon de la reĝino Jadwiga. Mi petis, ke ŝi montru ĝin al mi. Post ioma hezitado ŝi plenumis mian peton, prenis la bildon, starigis ĝin sur stablojn kaj jen... rigardis min dolĉa, ĉarma kaj malgaja vizaĝo de la juna reĝino, oferinta sian vivon por Polujo. La reĝino Jadwiga baldaŭ estos kanonizita kaj ĝuste tiu ĉi bildo estos aprobita por la kanoniza ceremonio.

Mi estas jam for de Kraków, tamen ne povas min forlasi la forta impreso de

tiu ĉi bildo, kiun mi havas ĉiam antaŭ okuloj.

S-ino Niedzielska estas granda amikino de Esperanto-movado. Iam ŝi havis lernolibron kaj studis la lingvon, poste diversaj aferoj detiris ŝin de Esperanto, sed volonte ŝi partoprenus kurson de nia lingvo kaj revenus al la movado. Kiam en fino de mia vizito mi diris al ŝi, ke mi estas esperantistino, ŝi treege ekĝojis kaj esprimis la deziron paroli nian lingvon kaj partopreni la Jubilean Universalan Kongreson de Esperanto en 1937. en Varsovio.

Kiu el krakovaj esperantistoj interesiĝos pri ŝi?

**Halina Weinstein.**

Varsovio, en junio 1936.

# PROTESTO.

Dum 28. Universala Esperanto Kongreso en Wien la prezidanto de U. E. A. Generalo Bastien informis la kongresanaron pri kriza stato en la organizaj aferoj kaj financoj de U. E. A.

Bedaŭrinde kontraŭ la kutimo de la pasintaj jaroj, dum la Viena Kongreso la Estraro de UEA prezentis en kongresaj dokumentoj nek raporton pri la agado nek financan raporton. Tial preciza pritakso de l' aktuala situacio en UEA estis neebla. Laŭ aliaj indikoj tamen estas sciate, ke kelkaj tre gravaj aferoj ne estis flanke de la estraro de UEA solvita laŭ feliĉa maniero.

Antaŭ ĉio la decido pri translokiĝo de Centra Sidejo de UEA el Ĝenevo al Londono. Kontraŭ tiu projekto, kies aŭtoron la esperantistaro eĉ ne bone konas, ĉar la decido okazis sen ia ajn publika pritrakto de la temo — kiam ĝi ricevis stampon de oficialeco — tiam kontraŭ ĝi protestis konataj seriozaj esperantistoj en Svislando, kiel samideanoj Bouvier, Richez, Hediger, Trembley k. a. kaj kaŭzis, ke Svisa Tribunalo konstatis rompom de la statuta de UEA (§ 5) kaj konsekvence starigis juĝejan pedelon por provizora gardo de la havajo de UEA en Ĝenevo.

Tia aferstato estas tre malagrabla kaj unuafoje okazas en historio de nia movado. La Estraro de UEA motivas la decidon pri translokiĝo al Londono per argumento, ke Londono estas malplikosta ol Ĝenevo. Sed la esperantistaro tion ne kredas kaj prezentas siajn kontraŭargumentojn:

1. Sidejo de UEA devas esti en neŭtrala lando pro politikaj motivoj. 2. Sidejo de UEA devas esti en Ĝenevo pro facila kontakto de UEA kun multaj aliaj internaciaj societoj, tie oficantaj, kaj facila ebleco kontakti kun reprezentantoj de ĉiuj ŝtatoj de l' mondo. 3. Dudekkvinjara tradicio esperantista rilate al ĝia Centra Sidejo en devas esti sen gravaj motivoj rompata, ĉar ĝi prezentas moralan kapitalon, kaj nia tasko estas ĝin konservi kaj kreskigi. 4. La translokiĝo de la sidejo de UEA al Londono estas rompo de la §. 5. de la Statuto de UEA. 5. La translokiĝo kaŭzas monperdojn, elspezojn kaj organizajn ŝanĝojn, kiuj estas evitindaj.

Pro tiuj ĉi motivoj grupo de kongresanoj dum 28. Kongreso en Vieno decidis publike priparoli dum laborkunsidoj la suprajn temojn kaj en ilia nomo parolis samideanoj: Dro Mędrkiewicz, f-no Dresen, Ŝapiro, Borel, Lejzerowicz k. a. D-ro Mędrkiewicz post sia parolado transdonis al ĝenerala sekretario de la Kongreso s-no Goldsmith skribe formulitan voĉdonproponon, kiu tekstis:

La 28. Universala E. K. en Vieno esprimas la deziron: 1. La Estraro kaj la Komitato de UEA sekvu la statuton. 2. Centra Sidejo de UEA restu en Ĝenevo konforme al la § 5. de la Statuto. Laŭ tradicia kutimo de la universalaj kongresoj la proponataj rezolucioj estas voĉdonataj dum la lasta laborkunsido. Same devis okazi en Vieno. Bedaŭrinde la Prezidanto de la kongreso ne volis voĉdonigi la supre cititan kaj laŭorde transdonitan voĉdonproponon. Anstataŭ ĝin submeti al voĉdonado kaj per tiu vojo konstati, kia estas la opinio de la esperantistaro rilate al la ideo pri translokiĝo de centra sidejo de UEA el Ĝenevo al Londono kaj rilate al metodoj aplikitaj en realiĝo de tiu ĉi ideo s-ro Prezidanto Generalo Bastien preferis eĉ fermi la kongreson ol plenumi mian insistan kaj rajtigitan peton, ke la proponita de mi rezolucio estu voĉdonata de la kongreso. Pro tiu ĉi malebligo de la voĉdonado, per subita fermo de la kongreso, mi ĝentile informis s-ron prezidanton generalon Bastien ke tiu ĉi cirkonstanco devigos min raporti skribe pri la okazintaĵo al esperantista preso kaj tion mi nun faras.

1. 9. 1936. **Dro Jan Mędrkiewicz.**

**Prezidanto de Pola Esperanto Asocio en Lublin.**

# REVENO.

Fine li estis heme. Malantaŭe jam restis la malfacila laborado eksterlande kaj akuta sopiro pri la reveno. La valizo estis plenplena kaj sur ĝia fundo, kune kun la plej-granda relikvo — portreto de knabino — kuŝis diversaj porvirinaj ornamaĵoj — oraj ringetoj, fantaziaj kolĉenoj kaj aliaj indaj rememoraĵoj. Tuj post la reveno, apenaŭ ripozinte post la longa, laciga vojaĝo, li ekrapidis al ŝi, kies portreto estis severe gardata en la valizo kaj por kiu estis destinataj tiuj belaj luksaĵoj. Sed la konatan pordon malfermis fremda, indiferenta persono:

— „Ŝi jam delonge ne loĝas ĉi tie!..."

Ni helpis al serĉado. Ŝi malaperis sen iuj postsignoj.

La tempo pasis. Tra rulpordo de la luksa, unuaklasa dancejo venadis multnombre gastoj. Sonis la muziko. Estis lume, gaje kaj brue. Subite ĉe unu el la proksimaj tabletoj li ekvidis ŝin. La unua ekmovo estis alkuri al ŝi, forte ŝin ĉirkaŭbraki, alpreni al sia brusto kaj kisi ŝian helan kapeton, kiel li faris ofte antaŭe. Sed la apudesto de fremda, nekonata viro haltigis lin, verŝis glacian duŝon sur la flamiĝintan koron. Post la momento iliaj rigardoj renkontiĝis. Je lia profunda, amplena, vokanta sinklino ŝi apenaŭ balancetis la kapon, daŭrigante la gajan interparolon.

La orkestro ekludis tangon. Tra la intence duonlumigita salonego ekfluis melankoliaj sonoj de la havajaj gitaroj. Sur la brila pargeto en la ŝanĝiĝanta lumo, jen ruĝa, jen ora, blua kaj arĝenta, ekglitis sub takto de l' muziko gedancantoj. La viro surmetis sian brakon sur ŝian ŝultron kaj la virino ameme, sindone, obeeme eksekvis ĉiujn movojn de la kunulo. Kaj en ŝia danco estis blinda sindono, pasia deziro kaj forta amo. Sentimentalan tangon ŝanĝis temperamentplena, brua rumbo kaj malnova, viena valso sekvis gajan fokstroton. Ili dancis multe kaj dum la tuta vespero eĉ ne unu fojon ŝi ekrigardis en lian direkton.

...Freneze martelis la tamburo. Arogante kriegis la saksofono. La zumado de interparoloj, rido, peze premadis la kapon. Pro perfumoj, ŝvitodoro estis svenige, abomene. Doloris la koro. Regis nur unu sola penso: „foriĝi, malaperi ien..., droni en la Nirvano..."

Li eliris sur la straton. La muziko sonis ankoraŭ en la oreloj kaj antaŭ la okuloj kvazaŭ en nebulo dancis, ĉiam dancis la paro. Jam estis malfrua horo. Pluvetis. La diverskoloraj reklamoj estingiĝis unu post la alia. Nur maldense lumis la stratlanternoj. De malproksime aŭdiĝis malvigla insultado de la dormemaj veturigistoj. El la mallumo altrude sin ofertis la virinaj siluetoj.

Sencela vagado tra la stratoj laciĝis lin. La malseka vento penetris ĝis la ostoj. Estis ĉiam pli malvarme. Subite eksonis proksime, varme, tente:

— „Venu al mi, kara!

Ili ekiris. En la malgranda, avare lumigita, ĉambreto, sur la malalta, vasta litkanapo pasie sin plektis la brakoj... Kaj li arde kisis la ŝminkitajn lipojn, vizaĝon, forgesinte, ke apud li kuŝas la knabino el la strato...

...Kaj kiam fruan matenon li revenis hejmen, li peze sin ĵetis sur la liton kaj longe, longe ploris.

**Isaj Dratwer, Varsovio.**

# SKOLTA ANGULO

## POLAJ „BRAVULOJ".

Lasttempe, la tuta skolta mondo parolas pri polaj „bravuloj". Tiel oni nomas knaboskoltojn, „lupidojn" de 7—11 vivjaro. Kaj nenio mirinda, ĉar ni jam antaŭenpaŝis tiudirekte multajn landojn, ne modelante nin je fremdaj organizaĵoj.

Konklude, per kio ni diferencas?

Ni diferencas per pola labormetodo, per polaj edukecaj celoj kaj per polaj eduk-kunvenaj temoj. Ĉe ni „bravuloj"— tio ne estas skoltoj. Konkurado, rivalizado malaperas je dua plano, kaj laboron oni ĝvidas per grupo. Celo de bravulo estas fariĝi — skolto! Kaj jen pro tio ni malproksimiĝas de ekzercoj kaj skoltaj metodoj, ĉar tiam en momento de enviciĝo en skoltan grupon, bravulo ne trovus ion novan. Bravulo revas kaj sopiras fariĝi skolto kaj atendas la momenton, kiam estro de lia grupo kavalirigos

lin al skolto, same kiel iam en Polujo novicon oni gradiĝis al kavaliro.

En la pola labormetodo ni forĵetis amuzadon en „ĝangalo“ aplikatan de Angloj. Por pola knabo „ĝangalo“ estas nekomprenebla, ĉar ĉe ni ĝi estas nekonata. Ĉe ni la steletoj kaj spertinsignoj havas alian karakteron, ili estas amuzo — same kiel ĉe lupidoj (en Francujo, Anglujo), kiuj estas malgrandaj skoltoj t. n. „malgranda skoltaro“.

Ni havas aliajn celojn/ edukajn. Anglujo havis liberecon, sendependecon kaj edukadis siajn junulo'n je liberaj civitanoj — kaj same ni faras tion nune. Ni devas nuligi niajn naciecajn erarojn: — pajlan entuziasmon, senpripensecon („lombardu kaj prezentu vin“), kaj antaŭ ĉio mankon de civitanec-sento. Unuvorte ni devas edukadi junulojn je knaboj konsciaj pri celoj kaj ripari tion, kion niaj aneksintoj inokulis.

Ĝuste pro tio ni posedas polajn temojn de la kunvenoj, kiu'n ni ĉerpas el nia folkloro kaj historio. Ni havas niajn naciajn dancojn, kantojn, popolajn ludojn kaj amuzo'n, historiajn, proprajn fabelojn, legendojn ktp. Lupidoj en Anglujo amuzadas sin je ĝangalo kaj ni je Slavoj, kavaliroj k.t.p. kaj iliajn bonajn kvalitojn ni penas inokuli en la animon de la pola knabo-bravulo. Ĉiuj scias, ke la pola knabo — bravulo. Ĉiuj scias, ke Slavoj estis gastemaj, ke kavaliroj estis kuraĝaj, bone faradis kaj distingiĝis ili per fervora kaj varma amo al sia kara patrujo. Tiajn noblajn ecojn per ludoj kaj amuzoj ni penas ellabori ĉe niaj knaboj. Granda helpo en tio estas ankaŭ niaj riĉaj regionaj kutimoj. Kaj vere, kial ni nin amuzu per tio, kio estas por nia pola knabo fremda, nekomprenata, kiam ni povas amuzadi nin je montaranoj, krakovanoj, silezianoj ktp.

Kaj fine: skolto laboras konscience, li havas antaŭ siaj okuloj skolta'n leĝojn, kaj komforme al ili, li formas sian karakteron. Bravuloj kontraŭe laboras subkonscie. Iliaj kunvenoj estas amuzo kaj nur la saĝa estro- pedagogo, per amuzoj kaj ludoj inokulas en la junajn korojn sublimajn kaj noblajn idealojn kaj la deziron kaj sopiron atingi la momenton, kiam ilin oni kavalirigos al skoltoj, kion ĉiam oni festas solene.

**Emil Mayer**
(Kraków — Polujo)

---

Redaktoro de la Pola Agentejo Telegrafa (PAT) en Varsovio, s-o Antoni Pisarski-Woydakowski, fondis Esperantan Oficejon Gazetaran, kies celo estas informadi la polan gazetaron pri la Esperanto-movado kaj la esperantan gazetaron pri la Esperanto-movado en Polujo kaj pri Polujo. Sed tio ne elĉerpas la planojn de la Esperanta Oficejo Gazetara, ĝi informas la registarajn kaj aliajn instituciojn pri la esperanta movado, kiel ekzemple:

La Ministerion de Poŝto kaj Telegrafo pri tio kion diversaj landoj faris (apero de p.kartoj kaj p.markoj kun esperantaj surpresoj ktp), la Trafikministerion pri Esperanto en librohoraroj fervojaj, turistajn instituciojn pri artikoloj esperantaj rilatantaj turismon en Polujo kaj ĝenerale pri turistaj eldonaĵoj esperantaj. Speciala fako okupiĝas per raportoj pri esperantaj gazetoj kaj libroj. Baldaŭ la Esperanta Oficejo Gazetara komencos eldonadi esperantlingvan bultenon por la esperanta gazetaro.

Adreso: Antoni Pisarski-Woydakowski, Direktoro de la Esperanta Oficejo Gazetara, Warszawa I, poŝtkesto 408, strato Złota 38/35. Pollando.

P. S. La Esperanta Oficejo Gazetara senpage donas ĉiajn informojn pri Polujo.


| | |
|---|---|
| PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40. | ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40. |
| OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.— | ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.— |

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. — KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

Drukarnia L. Gronusia, dzierżawca J. Kowalski. — Redaktor odpowiedzialny: Dr. Leon Rosenstock.


K.U.L.